

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsocia).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gilli Norda, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
D. v. Medem, bank- kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 206
24. 8. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvorto de 0,06 dolaro
aŭ 0,30 sv. fr. por landoj, kies valuto
sufiĉe malkonformas 80%: por ĉiuj aliaj
landoj 0,60 dol. aŭ 0,25 sv. fr.

Abonprezo

po kvadrata-centimetra egalvorto de
0,20 sv. fr. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fr.),
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La Deksesa.

(Daŭrigo.)

La radio-prezentado.

Vendrede vespere estis en la sama salono, kie okazis la interna malferma kunsido, radio-prezentado laŭ speciala interkonsento kun radiostacio de Wien. En la stacio diversnaciaj esperantistoj estis parolantaj kelkajn frazojn unue en sia gepatra lingvo kaj poste en Esperanto. En la salono estis starigita akceptilo kaj du megafonoj por laŭtigi la sonon de la paroloj, por ke ĉiu ĉeestanto povu ilin aŭskulti.

Scivoleme ni sidas sur niaj seĝoj kaj atendas. Subite aŭdiĝas laŭta sono, kaj ni aŭdas kelkajn parolojn en ĉi nacia lingvo. La plimulto el la ĉeestantoj kapskuas, nekomprenante la sonon de la paroloj. Sed poste la parolanto ŝanĝas la lingvon, kaj klare kompreneblaj vortoj esperantaj atingas nian oreilon. Kiam la oratoro finiĝis, la entuziasmita esperantista publiko aplaŭdas brue, kvazaŭ la parolinto mem ĉeestus.

Sekvas alia oratoro, tria, kvara ktp. Ĉiujfoje unue nekomprenablaj sonoj de ĉi nacia lingvo svingiĝas tra la aŭro, kaj ĉiujfoje poste sekvas belsonaj, klare kompreneblaj frazoj en Esperanto. Mi konstatis, kaj krom mi ankaŭ aliaj germanlingvanoj tion rimarkis, ke eĉ la parolojn en la germana lingvo ni komprenis malpli bone ol tiujn en Esperanto.

Fine ni aŭdis ankoraŭ koncerton de la radiostacio: muzikon de orkestro, kanton ktp.

Por multaj aŭskultantoj tiu radio-prezentado estis la unua en ĉi vivo, kaj tiom pli interesa, ankaŭ por mi, ĉar en la okupita Rejnlando la instalado de radio-aparatoj estas ankoraŭ malpermesita.

Oni ŝuldas multan dankon al s-o Isbrücker, kiu sukcesis akiri la konsenton de la radiostacio por tiu ĉi interesa eksperimento plene sukcesinta, kaj same al la direkto de la radiostacio mem pro ĝia komplezo.

Sabato, 9 aŭgusto.

Inaŭguro de memortabulo pri Zamenhof.

La sinjorino kun la demandoŝigno.

Senkulpiĝu min, se mia raporto ŝajnas eble iom poeca, iom nekomplicia aŭ ne tute laŭ kronologia sinsekvo; ĉar mi devas fakte ĝin verki kaj forsendi poepe. Estas malfacile, ŝteli inter la multaj kongresaranĝoj jen unu, jen kelkajn horojn por skribi. Kaj ne ĉiam oni estas ankaŭ en la ĝusta humoro. Foje mi sidas en kafejo, kaj la babilado de la homamaso min ĝenas, foje la ardanta suno elsekigas la karbon ktp. Do, ne juĝu tro severe mian raporton, se ĉi ĝi ne plaĉas al vi. Ĝi havas almenaŭ la avantaĝon, ke ĝi fidele respegulas tiun humoron, kiu ĝuste okupis min dum tiu aŭ tiu epizodo, kaj kiu estas ankaŭ la konforma humoro de multaj aliaj kongresanoj.

Kiel la du antaŭaj tagoj, ankaŭ la sabato estis ĉefe plenigata per fakaj kunsidoj.

Posttagmeze granda amaso da kongresanoj pilgrimis al Hotelo Hammerand en la oka kvartalo, kie estis okazonta la senvalorigo de memortabulo je honoro de Zamenhof, fiksita sur la fronto de la hotelo.

Nome de la Loka Komitato paroladis s-o Schröder; poste D-o Privat dankis al la wienanoj por la honoro, kiun ili faris al la majstro. Paroladis ankoraŭ Prof. Bujvid el Kraków kiel samlandano de la majstro. La inaŭguron finis kantado de la himno.

La memortabulo estas farita el griza marmoro kaj portas la jenan surskribon:

Dr. Lazar Ludwig Zamenhof

1859—1917

dem die Menschheit die Hilfssprache

Esperanto

zu verdanken hat, wohnte in den Jahren 1886 und 1897 in diesem Hause.

(Traduko.)

D-o Lazaro Ludoviko Zamenhof
1859—1917

al kiu la homaro dankas la helplingvon
Esperanto

loĝis en la jaroj 1886 kaj 1897 en tiu ĉi domo.

Laŭ la oficiala programo devis okazi nur hodiaŭ vespere la interkonatiĝa vespero de la kongreso. Je merkredo vespere la programo anoncis nur „unan reciprokan salutadon de la kongresanaro“. Mi do devas iomete korekti mian raporton pri merkredo, verkitan kaj tuj forsenditan antaŭ kelkaj tagoj.

Tamen ankaŭ hodiaŭ la interkonatiĝa vespero estas fuŝita; ĉar tute ne ekzistas salono por ĝi. En Praha ni havis idealan interkonatiĝan lokon en la ombumita parko sur insulo Žofín. En Nürnberg ekzistis la ejoj de la kongresdoma restoracio kaj la apuda ĝardeno. Sed ĉi tie en Wien la interkonatiĝo devas okazi en la koridoroj kaj sur la ŝtuparoj. Ĝardeno ne ekzistas, kaj la salonoj supozeble ne estas pretaj por tiu celo.

Ekzistas bela ĝardeno tute proksime; la urba parko, kun restoracio; mi ne komprenas, kial oni venigas la kongresanojn ne tien por la interkonatiĝo.

Nu, estas indiferente; estas jam tro malfrue. Cetera la humoro de la kongresanaro, aŭ almenaŭ de kelkaj spiritoj inter ili, estas brila. Nur malmultaj ĉagreniĝas efektive. Kvankam ĉi oni aŭdas la vorton: Terure! la plimulto provas per serĉado venki la malagrablaĵon.

En la vestiblo sidas sinjorino kun rezignema mieno. Sur la brusto ŝi portas paperon kun granda demandoŝigno. Kaj kiu ŝin demandas, kial ŝi sidas tie kun la demandoŝigno, al tiu ŝi respondas, ke ŝi volas demandi, kiam ja komenciĝos la kongreso?

Efektive, hodiaŭ en ĉiuj anguloj de la kongresejo, sur la koridoroj kaj ŝtuparoj, oni konstatas, ke la kongresanaro tute ne konsentas al la eksperimento provata la unuan fojon de la L. K. de Wien, sub ĝia propra respondo.

Do, ĉe estontaj kongresoj ni sekvu la tradician kutimon, komenci la kongreson per interkonatiĝa antaŭvespero kaj per solena malferma kunsido dum la unua kongrestago.

En Wien oni kuris nun jam tri tagojn, ne sentante, ĉu vere estas kongreso aŭ ne. Fakkunsidoj, kabaredo kaj Pratero — jen ĉio! Sed mankas ĝis nun la grandioza ekstakto, kiu tuŝas ne nur la praktikon, la racian aŭ la nervojn, sed la koron; mankas ankoraŭ la solena malferma kunsido, kiu ĝis nun tuj de la komenco inspiris al la universalaj kongresoj tiun spiriton de io granda, nobla, tiun sentimenton de kunaparteneco de l' tuthomaro, kiun ni ĝis hodiaŭ vane serĉas dum la Deksesa.

Se oni opinias, ke estas avantaĝe apartigi la fakkunsidojn de la oficialaj kongreskunsidoj kaj rezervi por ili kelkajn tufajn tagojn, oni metu ilin prefere je la fino de la kongressemajno.

Mi ne intencas riproĉi la L. K. pro ĝia eksperimento plene fiaskinta. Certe ĝi estis nova ideo, kiu valoris esti provata. Sed estas fakto, ke ĝi tute ne trovis la aplaŭdon de la kongresanoj; la konsekvenco estas nedubinda: ni forlasu tiun ideon kaj revenu al nia bona tradicio!

La solena malferma kunsido.

■ (Dimanĉo, 10 aŭgusto.)

Fine oni eksentas, ke oni partoprenas esperantistan kongreson. Fine tiu spirito, kiu ĉe antaŭaj kongresoj tuj de la komenco okupis la tutan kongresanaron, sentebliĝas ankaŭ tie ĉi.

La kongresejo havas ankoraŭ alian salomon, multe pli belan, multe pli grandan ol tiu, en kiu okazis la merkreda kunsido kaj la radio-prezentado. Oni nomas ĝin: la grandega salono.

Ĝi ne estas multe ornamita per esperantistoj, nur kelkaj flagoj sur la estrado — sed ĝi impresas per sia propra nobla beleco. Vaste ĝi volbiĝas super niaj kapoj, nenie ĉi kolono kiu ĝenu. Nur supre sur la tribunoj estas kolonoj videblaj. Kaj helaj ondoj da lumo enfluas tra la grandaj fenestroj — la salono estas vasta, bela kaj klare supervidebla.

La homoj sidas dense premite, eĉ sur la tribunoj. La estradon okupas la „eminentuloj“, la honorgastoj, la ĵurnalistoj. En honora loĝio ni rimarkas la satafan vivdivdon de la majstro, s-inon Zamenhof, kun sia filino.

Je 10.50 h. la kunsido komenciĝas per preludio sur orgeno. Poste miksitaj horo kantas kantojn „La Espero“ kaj „La Frateco“.

Kiel prezidinto de la XV-a Prof. Dietterle malfermas la XVI-an oficiale kaj solene, laŭ la tradicio. „Vivu la Deksesa!“ Li proponas liston de estraro, kiu estas akceptata:

Prez.: Ministeria konsilisto D-o Minibek.
Vicprez.: s-oj Schröder, Schamaneck, Privat, Warden, Merchant, Aktargiev, Kamaryi, Sieche, Deligny, Lajos, Filippetti kaj Bujvid.
Gen. Sekr.: s-oj Edmonds, Kreuz kaj Smilal.
Help-Sekr.: s-oj Halbedl kaj Blaas.

La Prezidanto D-o Minibek levigas por saluti la esperantistojn el la tuta mondo kaj danki al ili pro la elekto de Wien kiel urbo de la XVI-a. La 16-an fojon la esperantistaro kunvenis, Esperanto jam ne estas revo en la cerbo de idealistoj, sed ĝi vivas fakte, vivas pli kaj pli, malgraŭ ĉiuj frapoj, kiujn batita la mondilito al la internacia interkompreniĝo. Ni kunvenis por denove dankeme festi la Mondfeston de Esperanto. Malproksima estas ankoraŭ la ĉelo; sed ni vidas klare la vojon kondukantan al ĝi. Li diras, ke la wienanoj estas dankemaj, ke la esperantistoj elektis Wien. Li esperas, ke en la malmultaj tagoj de la kongresa semajno la kongresanoj konvinkiĝos, ke la ĉefurbo de Aŭstrio restis la sama, kia ĝi estis en pli felicaj tagoj: centro inter la popoloj de l' nordo kaj sudo, de l' okcidento kaj oriento, — germana kaj tamen internacia. — Li petas danki al la Prezidanto de la Aŭstria Respubliko D-o Michael Hainisch, ĉar li akceptis la altan protektoecon de la kongreso. Al tiu kaj la aliaj eminentaj protektantoj ni ŝuldas sinceran dankon. Apartan dankon ni ŝuldas al la Loka Komitato pro ĝia laboro kaj al la oficialaj delegitoj de eksterlandaj registarioj, ministrieroj ktp.: ĉeĥoslovaka, germana, hispana, nederlanda, pola, rumana, sudslava kaj al la oficiala sendito de Ruĝa Kruco. Dankon al la viro, kiu donacis al ni nian lingvon kaj kiu malperis tro frue. Ni sentas lian foreston; sed lia spirito vivas inter ni kaj donas al ni forton por daŭrigi lian verkon.

Oratoro salutas lian edzinon kaj filinojn, kiuj ĉeestas la kongreson. Dankas al la kongresanoj, el kiuj multaj venis el malproksimaj landoj. Li finas per la deziro, ke la Deksesa fariĝu nova limŝtono en la triumfa vojo de Esperanto.

Reprezentanto de la Kanceliero D-o Seipel transdonas en germana lingvo la saluton de la kanceliero.

La Prezidanto dankas. Krome oni sendos telegramon al D-o Hainisch.

Vicurbestro D-o Emmerling salutas la kongreson kiel reprezentanto de la ĉefurbestro en germana lingvo. Li diras, ke Wien havis jam ofte kongresojn, sed ankoraŭ ne tian, kiu reprezentas tiel kompleta la tutan mondon kiel la nuna. Deziras plej bonan sukceson.

Univ. Prof. D-o Süss salutas esperantilingve nome de la Universitato de Wien.

Nun D-o Privat levigas, tondre aplaŭdate de la kunvenintaro. Oni ne bezonas ripeti la laŭdojn, kiujn li ofte ricevis kaj meritis kiel oratoro fascinanta sian aŭdantaron. El liaj belaj paroloj mi citu nur kelkajn. Li diras ke, promentante tra la stratoj de la urbo kaj admirante la grandiozajn palacojn, li devis ĉagreniĝi, ĉar ili nun staras malplenaj. Kaj lin kaptis la penso, ĉu tiuj palacoj

ne povus fariĝi sidejoj de grandaj internaciaj organizaĵoj. — La esperantistoj detruas la dragonon de la diverslingveco, starantan apud la landlimo. — Niaj kongresoj donu al ni por unu momento realan imagon pri tio, kia estus la mondo, se ĉi tiu vivnivus homoj kun homoj.

Kun aplaŭdo de la tuta salono la Prezidanto dankas al la oratoro pro liaj belaj paroloj.

Nun salutas la oficialaj reprezentantoj de eksterlandaj registaroj:

la eksterordinara pola ambasadoro en Vien D-o Lasocki en lingvoj pola kaj esperania; Prof. D-o Dietterle por la germana Ministerio de Interno;

Komandanto Mangada nome de hispana registaro kaj de Ruĝa Kruco de Hispanujo; s-o Isbrücker nome de la nederlanda registaro;

D-o Fischer por la rumana Ministerio de Komercio kaj Industrio; krome s-o Morariu nome de rumana Ministerio por Interno kaj de Generala Direkcio de Polico kaj Ŝtata Sekureco. Plue salutas reprezentanto de Ruĝa Kruco en Genève s-o Horner; estas jam la kvaran fojon, ke li oficiale reprezentas Ruĝan Krucon ĉe Universala Kongreso de Esperanto.

Kiel reprezentanto de blinduloj salutas Prof. Kozmary.

Post paŭzo de kelkaj minutoj la delegitoj de la naciaj societoj diras siajn salutojn. La kongresa sekretario s-o Smital petas, ke ĉiu diru unu frazon en sia nacia lingvo kaj sinu en Esperanto, sed parolu ne pli longe ol unu minuton.

Jen la nomoj de la naciaj delegitoj:

Aŭstralio s-ino Scammel,
Belgiujo s-o Varendorf,
Bulgarujo s-ino Ŝismanova,
Ĉinujo s-o Kenn,
Ĉeĥoslovakio Prof. Kamaryt,
germanlingva s-o Scholze.

Danujo s-o Blicher,
Danzig s-o Aeltermann,
Finlando f-lino Tamminen,

Franĉujo s-o Deligny,
Germanujo D-o Steche,
Granda Britujo s-o Merchant,

Italujo Pastro Caroli,
Hungarujo s-o Lajos,
Jugoslavio s-o Domac,

Latvio s-o Grot,
Litovio s-o Medem,

Meksiklando s-ino Jaquel de Guerra,
Nederlanda deputatino f-lino Westermann,
Polujo Prof. Bujwid,

Rumanujo abato Cseh,
Ruslando s-o Markuse,
Skotlando s-o Kennedy,
Urugvajo s-o Munoz.

Post la salutparoladoj de la naciaj delegitoj la prezidanto fermas la kunsidon, sincere dankante al ĉiuj ĉeestantaj gastoj kaj esperantistoj kaj dirante, ke la hodiaŭa tago restos agrabia rememoraĵo.

* * *

La saman tagon vespere okazis Festa Koncerto de Wiena Ĥorsocieto sub direktado de s-o Grossmann kaj de Sinfonia Orkestro direktata de s-o Spörr. Kunagis ĝesolistoj s-ino De Haager (soprano), f-lino Kranner (aldo), s-o Neukirch (tenoro) kaj s-o Loibnegger (baso).

La koncerto sukcesis plene, kaj la aŭskultantoj dankis per longedaŭra aplaŭdo.

La humoro pliboniĝas.

La „poemoj“ de la restoraciisto.
Vera wienano ne pereas.

La bonege sukcesinta malferma kunsido kaj la belega festkoncerto kvazaŭ mirakle ŝanĝis la ĝeneralan humoron kaj kreis atmosferon pli liberan kaj pli agrablan. Plendoj fariĝas malpli oftaj. Oni komencas senti sin hejme en la kongresurbo de la Deksesa, malgraŭ la diversaj malagrablaĵoj ankoraŭ ekzistantaj.

Ne parolante pri la malfacilaĵoj estiĝintaj pro la neutiligo de spertoj faritaj dum antaŭaj kongresoj, la negermanlingvaj kongresanoj havas sufiĉe da peno por orientiĝi en la strataro kaj la aranĝoj de la milionurbo kaj en la kutimoj de ĝia loĝantaro.

Certe ekzistas taĉmento da esperantistaj policanoj, certe ekzistas helpemaj samideanoj, kaj ankaŭ la neesperantista urbanaro kondukas ekstreme afable kaj kompleze al la kongresanoj, precipe ja konduktoroj de la tramoj; sed estas neeble forigi ĉiujn malfacilaĵojn. Tion oni ja spertas dum ĉiuj internaciaj kongresoj.

Malgraŭ tiuj malfacilaĵoj, kiel mi skribis supre, la kongresanoj komencas senti sin hejme en Vien. La interna urbo, la Ringstrato, la kajoj, la Praterparko ktp. jam estas preskaŭ tute konataj, same la ĉefaj tramlinioj. Ankaŭ la fremdajn morojn kaj kutimojn oni ekscias, alkiutimiĝas al la manĝokarto ktp.

Parolante pri la manĝokarto mi devas diri, ke la wiena kuirmaniero estas tre bona, almenaŭ en la pli alirangaj restoracioj.

Foje mi sidis kun kelkaj samideanoj en restoracio apud la Ringo, kaj ni studis kune la

manĝokarton. Ni decidigis por „ova majonezo“. Servema kelnero alportis ĝin; ĝi aspektis tre apetiĝige.

„Ĉu ĝi ne estas vera poemo?“ demandis la restoraciisto. Kaj kiam ni konsentis, li aldonis: „Ho, mi havas ankoraŭ aliajn poemojn!“

Lia rekomendo bonefiks; ni mendis alian poemon „Omelette soufflée“. Kaj se la „poemoj“ de la restoraciisto ne estus iom multekostaj, ni plezure estus mendintaj ankoraŭ aliajn. —

Wien estas entute bela kaj interesa urbo. La interna kvartalo je la unua momento ja ne faras la plej bonan impreson; sed ju pli longtempe oni restas, des pli oni kutimiĝas je ĝi. La pli novaj kvartaloj kompreneble estas tute modernaj. La fiero de Wien estas la Ring-strato, kiuj ĉirkaŭas la malnovan kvartalon, kaj la kajoj apud la kanalo de l' Danubo, kun multe da belegaj palacoj, teatroj, preĝejoj kaj monumentoj. — kaj, kompreneble, la Prater-parko, promenejo kaj refreŝigejo por la urbanoj dum liberaj horoj.

Ne estas celo de mia raportoj, detale priskribi ĉiujn vidindaĵojn de Wien. Oni legu pri ili en specialaj gvidlibroj.

La wienanoj estas gaja kaj iom oportuna popolo. Tiaj ili jam estis antaŭ la milito, kiam ilia urbo ankoraŭ estis ĉefurbo de granda, riĉa regno. Tiaj ili restis ankaŭ post la katastrofo de la pakontraktado, malgraŭ ĉiuj batoj kaj mizeroj.

„A echter Weaner geht nie unter“ (Vera wienano ne pereas) — sub tiu ĉi devizo vivas la wienanoj, speciale kiam ili froviĝas en sia kafejo, da kiaj ekzistas en Wien treege granda nombro, aŭ kiam ili sidas kune kaj trinkas „Heurigen“ (novan vinon).

La kafejoj allogas ankaŭ multajn kongresanojn kaj, ĉar kelkaj estas malfermitaj ĝis matene, estas kaŭzo, ke diversaj samideanoj venas en la matenkunsidojn kun dormemaj okuloj aŭ — tute ne venas.

La laborkunsidoj.

(Lundo, 11 aŭgusto; mardo, 12 aŭgusto; merkredo, 13 aŭgusto.)

Pri la laborkunsidoj detaliaj raportoj aperos poste. Mi nur donas hodiaŭ tre koncizan resumon.

Lunde oni legis la saluttelegramojn kaj -leterojn kaj diversajn raportojn kaj decidis ĉesigon de K. K. K.

Marde oni ĉefe pritraktis la regularon de la kongreso kaj aŭskultis pliajn raportojn kaj informojn.

Merkredo oni eksciis, ke la inaŭguro de la tombomonumento al D-o Zamenhof povos okazi nur en somero 1925 aŭ 1926.

Oni diskutis priskribon al Nobel-fondaĵo en Stockholmo por ricevi premion al la vidvino de la majstro.

S-o Horner donis informojn pri Esperanto kaj YMCA (Kristana Asocio de Junaj Viroj) kaj faris kelkajn interesajn proponojn.

Estis legataj raportoj, plendoj kaj rezolucioj de fakkunsidoj.

Kongreso deklaris, ke pro sia regularo ĝi neniel estas burĝa aŭ laborista kongreso, sed neŭtrala kongreso de ĉiuklasaj esperantistoj.

Koncerne la kongreslokon por 1925 oni ekscias, ke neniu urbo invitis por tiu jaro, sed ke por 1926 jam estas pluraj invititoj.

S-o Merchant invitas kongresi en Granda Britujo por 1926. Li diras, ke la prezidanto en Granda Britujo estas malpli altaj ol en Vien.

S-o Privat komunikas, ke C. K. havas tri ideojn, se en 1925 ne povus okazi kongreso:

1. Esperantista Somera Universitato en Svisujo;
2. Kongreso pri iu idealista demando, ekz. pacifista;
3. Tutmonda turista kongreso.

Je la fino de la kunsido la Prezidanto D-o Privat esprimas la dankon al la Loka Komitato. Ili faris multon, ĉar ne estas facile aranĝi kongreson por 3000 homoj, tiom pli, ĉar la esperantistoj estas iom sendisciplinaj homoj. Ĉi tiu kongreso estas la lasta de la unua periodo (periodo de organizado), venas nun la dua periodo (periodo de praktika laborado).

S-o Schröder dankas nome de Loka Komitato al la kongresanoj, ĉar ili faris tiel longan vojaĝon, ĉar ili devis suferi fomete, precipe pro la prezoj ĵus denove aliĝintaj en la lasta tempo. Li petas rememori pri la belajoj pli ol pri la malagrablaĵoj.

Post tio D-o Privat fermas la kongreson.

La pacifista manifestacio.

Pli ol 3000 personoj partoprenis.

Pri la pacifista manifestacio skribas la wiena ĵurnalo „Reichspost“ la 12 aŭgusto sub la titolo „Esperanto-porpac manifestacio“.

En la kadro de la Universala Esperanto-Kongreso aranĝis la „Universala Esperantista Pacifista Ligo“ hieraŭ posttagmeze (3.30—5.45) en la grandega saĉono de la kongresejo (koncertdomo) solenan porpacan manifestacion esperant- kaj germanlingve, ĉar krom la esperantistoj ankaŭ tre multaj wienanoj ne-esperantistaj partoprenis (entute pli ol 3000 personoj). Inter tiu ĉi manifestacio — oni devas precipe konstati tion — kaj inter la aliaj publikaj „neniam plu milito“ — kunvenoj, kiuj okazis dum la pasintaj semajnoj,

estis tre granda kaj bona diferenco. Tiu ĉi manifestacio pruvis, kiamaniere pere de Esperanto la anoj de la plej diversaj nacioj — absolute ne tuŝante la propran amon je la patrolando — plej belharmonie povas vivi unu kun la alia.

Prezidis la nova prezidantino de la Ligo s-ino Julia Isbrücker* el Hago (Holando). La aŭstran respublikon reprezentis s-o sekcio-konsilisto D-o Maksimiliano Hell, kaj la polieprezidanto Schöber, kiu ja estas la prezidanto de la „Tutmonda Polic-Ligo“, s-o policedirektoro D-o Schulz. La urbestro intencis partopreni; li senkulpiĝis sin per aliranga magistrata oficisto. Krome sendis kongegajn literajn salutojn la prezidanto de la aŭstra respubliko D-o Hainisch kaj la ministro por instruado, same alvenis salutleteroj de s-ino Hankel el Dresden, de la Finlanda Esperanto Pacifista Ligo, la Bulgara Vegetara Asocio, la Internacia Virina Ligo por Paco kaj Libereco (Genève), la Internacia de Kontraŭmilitistoj (London), la brita sekcio „Neniam plu milito“ ktp., Telegrafisto Otto Simon kaj la prezidanto de la Aŭstra Pacifista Societo.

La manifestacio komenciĝis per preludo en Es-dur de J. S. Bach sur la granda orgeno, ludita tre efektive de la samideano Karl Mätzl. Post tio la aranĝinto de la pacifistaj kunsidoj, general-sekretario de la Ligo, Rudolf Michael Frey salutis kaj dediĉis al la memoro de la morinta unua ligoprezidanto prelato D-o Aleksandro Giesswein solenan paroladon, dum kiu la tri mil personoj funebrante staris. Sekvis la raporto Postkiam ankaŭ la prezidanto de la Ligo de Instruistoj s-o Degen el Leipzig kaj la ĉina ĵurnalisto Kenn estis salutintaj, paroladis la protektanto de la „Pacifistaj Kunsidoj“, dekanato de la Wiena Universitat-fakultato Prof. D-o Süss. Post paŭzo s-o Mätzl ludis la belan „Benedictus“ de Max Reger sur la orgeno kaj la „burgarkanto“ solene deklamis la „Preĝon sub la verda standro“, dum kiu du junaj eksterlandanoj en naciaj kostumoj alie tenis grandan verdan rubandon kun la blanka surskribo „Universala Esperantista Pacifista Ligo“. S-ino Isbrücker paroladis pri la programo de s-o Spiller en Genève (estonta seĝara laboro kontraŭ militoj). La lasta kaj ĉefparoladanto estis s-o D-o Privat. Ĉiuj paroloj estis tradukataj en la germanan lingvon. Fine kun granda entuziasmo la esperantistoj, akompanataj de la orgeno, kantis la esp. himnon.

La laborkunsidoj okazis la 7-an, 8-an kaj 12-an sukcesplene. —

* Viceprezidanto de la ligo estas s-o Walter Smital, kanzler s-o bankprokuristo Karl Klausnitzer kaj Viktor Kasmader, ĝen. sek. est. s-o Rudolf Michael Frey, Wien 2, Bechardgasse 14.

Grafo Bernstorff pri Pacifismo.

Grafo Bernstorff, iama germana ambasadoro en Washington, en tiu ĉi aliranga pozicio ĉiam paradas por la paco, kaj pro sia pacamo li havis multe da melankolio. — En impone parolado ĉi ĉi fama diplomato ankaŭ skizis sian opinion pri la pacifismo kaj afable disponigis parton el tiu ĉi parolado al la prezidanto de la Esperanto Gruparo Berlin, s-o Direktoro Glück, por publikigo en la esperantista gazetaro. — Ni ĉi tie donas mallongan resumon el tiu ĉi parolado, supozante, ke ĝia enhavo havos grandan aktualan intereson por nia legantaro.

La pacifismo, kiel ankaŭ ĉe militariste edukita popolo almaniere ne estis eble, en Germanujo nur malmulte penetris en vastajn randojn. Nuntempe ĝi multe perdis, ne povante nek mallongigi la militon, nek formi la pacajn intertraktojn aŭ la ligojn de la nacioj laŭ siaj idealoj. Tial la politiko, eĉ rigardante la pacifismon kiel idealon, ne povas agi laŭ tiu ĉi idealo, ĉar ankoraŭ regas imperialismo. Sed pro tio ni ne malediĝu la pacifismon, tielmaniere, kiel ni ne pli malmulte ŝatas la religion pro tio ke la „prediko sur monto“ dum la bataĵoj de l' vivo ne povas esti plenumigota.

La pacifisma ideo kreskas kaj kreskas inter la popoloj. Antaŭ la milito, kontraŭstarante la demandojn pri arbitracia tribunalo kaj pri malarmado, ni tion ne komprenis, almaniere multaj faktoroj ne estus okazigintaj. Tia miskompreno de la pacifismo multege malutilis al ni, eble eĉ kaŭzis nian militan malsukceson. La diplomatoj de la „Entente“ kvankam ofte devigataj agi en kontraŭa senso, ĉar ili devas pririgardi la publikan opinion, tamen treege respektis la pacifismon.

Por ke la pacifismo sukcesplene enpenetru ankaŭ en Germanujon, unue devas regi justeco kaj vera persona libereco de la popoloj.

La kongreso de la universitataj virinoj por Esperanto.

Kristiania. Ĉe la tria internacia kongreso de l' universitataj virinoj la demando pri internacia lingvo oficiala provokis interesajn diskutojn. Fine la kongreso deklaris sin favora al Esperanto kaj ĝi malakceptis la anglan lingvon; ĝi same malaprobis ĉiujn aliajn malnovajn aŭ modernajn lingvon.

Zamenhof monumento.

Raporto de la organiza komitato al la Deksesa.

Post la Kongresa aprobo de nia lasta raporto en Nürnberg 1923, kiam la premiita verko Nr. 1 estis definitive akceptita, la Honora Sekretario de la organiza komitato renkontis ĉi kunveno en Warszawa la lokan por monumento komitaton. En tiu kunveno oni diskutis detale ĉiujn aferojn por plua agado. Estis tiam decidite, ke la tuta monumento estu skulptita en Skotlando, kaj laŭ decido 3 de Nürnberga kunveno, la materialo estu skotlanda granito.

La Org. Kom. agis laŭ tiu decido kaj kontraktis tre favore kun bonega skulptisto en Aberdeen, la fama granit-urbo de Skotlando, por ĉizeli la monumento el blank-griza granito de Kemnay-a kvalito, kiu havas longdaŭrecan famon. La monumento nun proksimiĝas al kompletigo, kaj post nelonge, eble jam dum la nuna kongreso, la Org. Kom. esperas povi sciigi al la Esperantistaro pri ĝia enŝiĝo por transporto al Polujo. La monumento estos enpakita en sep kestoj kaj pezos ĉirkaŭ ok tonojn. Ĝi estos transportita surmare ĝis Danzig kaj de tie fervoje al Warszawa.

Laŭ sciigo de la loka por monumento komitato, la tombo estis tute rekonstruita kaj la fundamento estas tute preta por ricevi la monumenton por surstarigo.

La klopodoj de la Org. Kom. por ricevi de tiu ŝip-kompanio senpagan transporton de la Monumento al Danzig, ĝis nun ne sukcesis. Ankaŭ la alpeto sendita al la Pola Registaro por permeso eniri la monumenton en Polujon sen dogan-pago, restis ĝis nun sen respondo, kvankam la alpeto ricevis subtenon de diversaj flankoj, de Naciaj Esperantaj Organizo kaj de influhavaj personoj. La Org. Kom. tamen ne ankoraŭ perdis la esperon ke la Pola Registaro, kiu bone komprenas la gravecon de nia movado, kaj taksas la honoron de la kreinto de Esperanto, fine cedos al nia peto.

Surskribo de nomoj sur la monumento.

Oni memoras la decidon ĉe la lasta kongreso, ke nomoj de Naciaj Societoj de Esperantistoj estu gravurita sur la flankoj de la monumento kaj, ke la Org. Kom. ekzamenau la minimumajn pagokondiĉojn de ĉiu lando por rajtigo al tia surskribo. Post longa kaj zorga prikonsidero de tiu punkto, la Org. Kom. venis al la konkludo, ke tiu propono estas ne praktikata. La monumento do nur havos la tekston „starigita de la tiumonda esperantistaro“. Tamen, se la Kongreso nepe desiras reteni tiun antaŭan proponon, la nomoj povos esti surgravurita post la starigo de la monumento laŭ poste decidota plano.

Financo.

Ni aldonas aparte la raporton de la Honora Kasisto, kiu montras ke ni havas en la kaso la sumon de ĉirkaŭ £ 287. Ni povas do jam nun konjekti proksimume kion ni efektive bezonos en mono, por efektiviĝi la unuan celon de nia ko-

mitato, t. e. la starigo de monumento sur la tombo de nia Majstro.

Kosto de la Monumento ĉe la Skulptisto	£ 225 00
„ „ transporto, Danzig-Warszawa (proksimume)	„ 4000
„ „ Dogan depago 10%	„ 2500
„ „ Starigo sur la tombo (maksimume)	„ 5000
Entute ĉirkaŭ	„ 34000

Do mankas ankoraŭ la sumo de ĉirkaŭ £ 5300.

Se la Pola Registaro cedos al nia peto, ni ŝparas £ 25, aliflanke ni havas antaŭ ni la sinceran deziron de niaj Polaj samideanoj pagi el siaj poŝtoj la transportkostojn inter Danzig kaj Warszawa kaj ankaŭ la koston de la starigo sur la tombo. Oni ne forgesu ke estos necese fari iajn provizojn por daŭra prizorgo de l' monumento kaj la tombo.

Monkolekto.

La Org. Kom. ĝojas sciigi, ke post nia raporto al la Nürnberga kongreso, la konscienco de la esperantistaro pri tiu afero iom vekigis, kaj rezulte el tio alvenis al niaj kofroj kelkaj sumoj de diversaj flankoj. Tio alportis dum la jaro ĉirkaŭ £ 147. Sole el Aŭstralio venis £ 55 el tiu sumo. La cetera mono el la tuta mondo. Oni tamen vidos ke niaj kunhelpantoj ne devas ankoraŭ ĉesi la monkolekton. Aparte en tiuj anguloj kaj landoj, kiuj kontribuis aŭ nenion, aŭ nur bagatelajn sumojn kompare al la grandeco de la movado en tiuj lokoj. Ni povus citi la nomojn de tiuj lokoj, sufiĉos tamen aldoni analizan liston de la mondonacoj laŭ landoj, kaj laŭ la graveco de la mondonacoj de tiuj diversaj landoj. La sperto jam al ni montras ke ĉiu esperantisto estas tute preta oferi iom por la honorigo de nia kara Majstro, necesas nur havi personojn, kiuj bonvolos oferi sian tempon kaj energion por iri kaj kolekti tiun gravan mondonacon kiu efektive atendas lin, kaj la Org. Kom. sin turnas nun denove al kunhelpantoj tra la tuta mondo por veni al ĝia helpo.

Kupon-kartoj.

Per ĉi tiu ni petas tiujn personojn kaj societojn, kiuj jam vendis la kartojn aŭ parton da ili, ke ili tre baldaŭ sendu al ni la monon ricevitajn.

Analiza listo laŭ landoj de la mondonacoj.

Britujo	100.15.7	Brazilujo	4.11.0
Aŭstralio	85.16.5	Svedujo	4.2.1
Nederlando	25.18.5	Algerio	4.0.0
Usono	21.6.6	Danio	5.9.5
Cehoslovakio	15.18.8	Polujo	3.18.0
Belgiujo	10.19.5	Jugoslavio	3.15.0
Japanujo	11.0.0	Italio	3.7.0
Francujo	10.2.0	Meksiko	3.1.1
Hispanujo	8.5.11	Kubo	2.5.0
Svislando	7.2.5	Hungarujo	1.1.0
Finlando	6.18.0	Estonio	1.0.0
Germanujo	6.12.8	Kanado	1.0.0
Uruĝujo	5.19.2	Aŭstrujo	15.4
Litovio	5.14.10		

La Org. Kom. esprimas sian plej sinceran dankon al ĉiuj kunhelpantoj en la monkolekto kaj al la ĉefaj Esp. gazetoj „Esperanto“ kaj „Esp. Triumfonta“ kiuj disponis spacon por artikoloj

kaj raportoj, sen ilia helpo niaj klopodoj estus preskaŭ neeblaj.

Oficeja Statistiko.

Leteroj ricevitaj	555
Leteroj forsenditaj	545
Cirkuleroj	850

J. D. Applebaum,

Honora Sekretario de la Organiza komitato

de la Internacia Komitato,

11 Mayville Rd., Mossley Hill, Liverpool, Anglujo.

Julio 1a, 1924.

Bilanco 1923-24.

Enspezo		D-o Robin por Fundamento por tombo	£ 3.0.0
Transporto de 1923	£ 145.4.8	Diversaj elpezoj	„ 2.6.7
Mono ricevita	„ 147.8.5	Saldo	
		Depozita en banko	£ 284.15.1
		Ĉe la kasisto	„ 2.13.3
			£ 287.6.4
			£ 292.12.11

31 Queen Street, Edinburgh, Skotlando.

Honora Kasisto W. M. Page.

Socia Vivo.

Columbia Universitato en Nordameriko.

Ĝi estas la plej granda altlernejo en la mondo. Ĝi estis konstruita kaj estas nun administrata sen ŝtata helpo, tute per la ofero de la publiko kaj la amerika publiko posedis, tiun ĉi fojon vere brillan senton pri la valoro de la kulturo. La Universitato posedas en sia havaĝo 60 milionojn da dolaro kaj grandan terenan propraron. Pofare ĝiaj elspezoj por la instruado superas la sumon de 10 milionoj da dolaroj. La Universitato havas 50.000 ordinarajn kaj 50.000 neordinarajn studentojn kaj enhavas ne nur la tradiciajn kvar fakojn (teologio, juro, filozofio kaj kirurgio) sed ankaŭ la plej diversajn teknikajn, komercajn kaj eĉ artajn fakultatojn. La konstruajokonglomerato konsistas el dudek ĉefaj institutoj kaj el granda nombro de pavilonoj por fakaj celoj. Nature ĝi havas propran radiostacion kaj grandan observatorion por astronomia esplorado. Rilate al la tolerema, vere „universitata“ spirito estas karakteriza la fakto ke la kristanaj, protestantaj kaj izraelidaj teologoj studas en la sama instituto, ofte en komuna kolegio.

Ekstrakto el „Világ“ Budapeŝt. Jozefo Major, Budapeŝt.

Imposto je fraŭloj en Ukrainio.

Tutukraina komitato de Sovjetoj aprobis antaŭ kelka tempo la leĝprojekton pri imposto je fraŭloj pli ol 18-jaraj, se ili edukas nenies infanojn aŭ ne havas invalidiĝintajn gepatrojn. La imposto estas destinita speciale por protekto al orĝaj infanoj, kies nombro en sovielandoj ĉiam kreskadis. Laŭ opinio de aŭtoroj de leĝprojekto la nomita imposto havas grandan social-politikan signifon, ĉar la fraŭloj partoprenos en la elspezoj de la ŝtato por komunuma edukado de la orĝaj infanoj; krom tio ĝi ankaŭ korektos la nunan sistemon de salajrado, kiu ne distingas tarife la fraŭlojn je la famiuloj.

N. Krasovskij (Ufa, Rusl.)

Bibliografio.

Spoken Esperanto by the direct method. For Beginners. Compiled and published by Norman W. Frost, Cambridge 53, Mass. Usono. 92 pg. 25x15,5 cm, forte broŝurita, Prezo 0,50 dol.bros., 1 dol. tolbind.

La lernolibro estas interesa provo apliki la rektan instru-metodon por lernigo de Esperanto al angloj. Oni komprenas, ke tio estas speciala malfacilaĵo por tio, ke por anglo Esperanto signifas lerni novan sintakson kaj antaŭ ĉio novan kaj klaran elparoladon de sonoj. Mi devas konfesi, ke tiurilate la aŭtoro ege klopodas atingi la celon. Li dediĉis plurajn lecionojn al la ekzerco de la alfabeto. La aplikita kiel metodo tamen diferencas senteble de tiu, kiun ni ĝenerale en Eŭropo karakterizas tia. Mi almenaŭ ne trovis laŭsistemecon en tiu ĉi broŝuro. Povas tamen esti, ke por angloj la arango estas laŭcela.

La ekzercoj estas tre ampleksaj. Tre bona estas la klarigoj pri korelativaj vortoj de la Zamenhofa tabelo, la ĉapitro pri sintakso ktp. Kelkaj ilustraĵoj vidigas la uzon de intucio. Bedaŭrinde la klisoj estas tre malklaraj. Ankaŭ kelkfoje la silbo ne jam estas flua kaj vidigas, ke en tia granda unulingva teritorio mankas praktikaj parola eĉ al tre aktivaj esperantistoj kaj aŭtoroj. Mi ne dubas, ke la mankoj estas forigibla en espeeble baldaŭ aperonta dua eldono. Entute la libro estas bone presita kaj aranĝita.

Dizionario Esperanto-Italiano di G. Puccinelli. Tria eldono. 248 pg. 10x14 cm, tole bindita, eldonis R. Gluski, Livorno. Prezo ne indikita.

Antaŭ ne longe jam aperis en la sama eldonejo Itala-Esperanta Vortaro de Mezzini. Ankaŭ la nova eldonaĵo estas solutinda. Koncerne la pres-kaj alian arangan oni devas diri, ke la eldonisto klopodis kontentigi eĉ postulemajn homojn. Rilate la lingvan enhavon oni devas diri, ke la verko estas tre lerte kaj zorge kompilita. En speciala komplemento la aŭtoro indikas la plej novajn vortojn nun uzatajn en la praktiko. Ĉiu italo kaj ĉiu praktikisto, kiu por komparoj ofte bezonas fremdlingvan vortaron esperantan, devus posedi la tre plaĉan libron.

Vortaro Esperanto-Bulgara de H. H. Bačvarov. 254 pg. 10,5x16 cm, broŝur., prezo 55 levoj, havebla de la aŭtoro H. Tirnov, Bulgario.

La verko reprezentas tre zorgeman laboron de sperta samideano. Ĝi enhavas ne sole la tutan radikon, sed ankaŭ grandan parton de plejnovaj kaj en la novtempa literaturo esperanta enkondukitaj vortoj. Speciala avantaĝo estas la indiko de ĉiuj derivaj list sistemo nun ofte aplikita. Preso kaj papero estas bonaj. Dezirinde estus pli forta bindado. La nemultajn preserarojn, montritajn en aparta listo la aŭtoro sendube povos forigi en dua ledono. Sendube estos ankaŭ dezirinde, ke aperu la inversa partio: bulgara-esperanta. Mi rekomendas la libron al ĉi bulgara samideano.

R. Kr.

Kvin Noveloj. Friedebert Tougas, el la estona lingvo tradukis Henriko Seppik. 160 pg. 15x20 cm, broŝurite, kun tipogravuro de la aŭtoro. Eldonis: Mari Tamverk. Esperanto-fako, Haapsalu, Estonio. Prezo 5,5 sv. frk.

Post ne longa tempo la eldonejo aperigis trian bele aranĝitan libron. Prezo, papero, arango estas treege kontentigaj. Preserarojn mi apenaŭ trovis. Pri la enhavo mi ne bezonos paroli. La nomo de estona literaturisto Fr. Tougas estas rekomendo por si mem. La esp. tradukon faris sperta samideano H. Seppik, kiu maistras nian lingvon. Uzo de kelkaj neologismoj, klarigitaj en tabelo je la fino, eble estis evitinda. Ekz. razeno kaj gazono (laŭ du div. vortaroj) koincidas. Nur unu formo povas esti elektata. Regresi laŭ Verax tute ne taŭgas. ŝminki kaj vinzi estas superflujaj neologismoj. Resume: la libro malgraŭ ĉio estas bonega kaj rekomendinda al ĉiu literatur-amanto. Mi ne dubas, ke la vigla eldonejo baldaŭ aperigos kvaran verkaĵon el la supozeble antaŭvidita plena serio. Ĉu rekomendi la nunan libron? Jes, nepre.

R. Kr.

K. Brüggemann. Historio de Esperanto kun la paroladoj, leteroj ktp. de D-o Zamenhof, Universala Biblioteko No 3. 105x15,5 cm, 160 pg. broŝ. Eldonis Esperanto-Verlag Friedrich Ader, Dresden-A-27. Prezo Mk. 1.20.

Malnova samideano prezentas al ni en tiu sukcesplene komenciata serio la historion de Esperanto laŭ nova arango laŭ div. periodoj, fakoj ktp. Ĉiu esperantisto devas koni la historion de nia movado. Legante tiun ĉi libron, li plene informigis sin. Tiu, kiu submetos sin al ekzameno nepre devas posedi ĝin. La fina parto de la libro enhavas la detalojn pri uzo de Esperanto en plej div. sferoj. Preso kaj arango estas modelaj. Preserarojn mi apenaŭ trovis. En la praktika parto mi nur renkontis kelkajn eraretojn, pri kiuj mi lere informos la aŭtoron.

R. Kr.

Ni Legu. Internacia Legolibro, de Brunilo I-a parto. II-a eldono korektita kaj reviziita. 17,5x12,5 cm, 112 pg. Eldonis SAT, 23, rue Boyer, Paris XX.

La libro enhavas 45 rakontojn poemojn kaj humorajn el 15 div. lingvoj. Ke jam povis aperi dua eldono pravas, ke la libro estas bona. Preso, arango, kovrilo, papero tre kontentigaj. Sekvu ĉiu eldono plej baldaŭ.

R. Kr.

Oficiala Jarlibro de la Esperanto Movado 1924. 12 jaro, 165x11,5 cm broŝ 370 pg, kun suplementa tabelo. Eldonis: Universala Esperanto Asocio, Genève, 12 Bd. du Théâtre.

Denove UEA donacas al ni jarlibron sub nova titolo: oficiala jarlibro de la Esperanto Movado. Tiu, kiu konas la praktikan laboron de UEA kaj ĝian rolon kiel unika organiza en nia movado povas kompreni, ke nur tia impona organizo kapablas aperigi tian ampleksan

informilon pri nia movado. La jarlibro superas ĉiujn antaŭajn je eksterordinara grado. Speciale menciinda estas la plimpleksigo de la ĝenerala parto informo. La vojo al baldaŭ aperonta vera „Alamanako“ jam estas skizita. Detala listaro montras la delegitojn de UEA en ĉiuj landoj ĝis 31. 1. 24, la nomojn de asocioj, gazetoj ktp. Surprizas la erogo de anojn de firmaoj, uzantaj Esperanton. La tute vidigas, ke la kompilinto de la jarlibro, senlaca samideano Jakob, direktoro de UEA, dediĉis sian tutan amon al la verkaĵo. La libro faras bonegan servojn al ĉiu samideano, speciale tamen al la propagandisto. Li povos pruvi per ĝi, ke nia movado estas forta, impulsa. Preseraroj ne estas multaj, kelkaj rezultas el maŝinkompostaj mankoj. Preskaŭ ĉio en la libro estas modela nur sole unu ĉefan mankon la libro havas: ĝi aperis tro malfrue. Ni esperu do, ke en venonta jaro UEA sukcesos aperigi la libron komence de l' nova jaro. Tiam ĝi ankoraŭ multe pli utilis ol post apero en junio.

R. Kr.

Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris-Leipzig Jarlibro 1924. 17x12 cm, broŝ. 320 pg., kun aldona sektora karto geografia. Akirebla nur per membrigo.

Al tiu, kiu ne jam kredas pri la etendiĝo kaj forto de nia movado, montrebla per UEA, oni montru tiun ĉi jarlibron de la laborista movado esperantista. Laŭ simila maniero kiel UEA, sed tre speciale adaptita al la bezonoj kaj deziroj de laboristo-esperantisto la jarlibro de SAT estas bonega pruvilo pri la seriozece de la laboro de laboristaj esperantistoj. Granda parto de la jarlibro, kvazaŭ almanako laborista, informas pri la laborista movado. Kelkaj bildoj ilustras la tekston. Tabeloj diversspecaj pri salajroj, senlaboreco, aktiveco, vivnecesajfoj ktp. donas bonan superrigardon pri la ekonomiaj statoj en diversaj landoj kaj kontinentoj. Alia parto informas pri laborista literaturo ktp. Lasta parto enhavas la nomojn de SAT-membroj en la tuta mondo. Oni devas gratuli s-on Barnier, nomita al ni kiel kompilinto kaj al liaj helpantoj pro la laŭcela laboro, kiu helpas al ni atingi la celon en la sfero de niaj komunaj intereso.

R. Kr.

La familio Gerak. Novelo de Elin Pelin, tradukis el bulgara lingvo de Atanas D. Atanasov. Esp. Koopera Soc. en Bulgario, Sofia 1924.

Elin Pelin. Tiu ĉi nomo diras sufiĉe por rajtigi la tradukon de la novelo „La familio Gerak“. E. Pelin estas la pristinbriga de l' simpla bulgara popolo. En tiu ĉi novelo li prilumas la ideon, ke la patriarka vivo en la famliaj komunaj sub la efiko de la nova moderna vivo kaj sub la influo de la ĝenerala emancipado de l' novaj generacioj disfalas, montrata de la familio Gerak. La tradukaĵo estas flua kaj ĝoiziga ne sole la esperantajn geleamantojn. Ankaŭ la perfektuloj prenos danke tiun ĉi laŭdindan laboron de fervora samideano.

Hans Dahmen, Horrem.

Tekniko.

Centjara jubileo de la kinematografio en tiu ĉi jaro.

Oni ne scias precize, kiu eltrovis ĝin Ĉi devenas de Anglujo kaj la unua izbla maŝino (kun perforita filmo) devenas de Edison. William Friese-Greene (Anglujo), kiu mortis en 1923 malriĉe, estis konsiderata kiel la elpensinto de la kinematografio. Lia filo eltrovis la novan koloran sistemon, kiu estis uzata ĉe la lasta Mont-Everest ekspedicio. Guste antaŭ cent jaroj D-o P. M. Roget, sekretario de la fama "Royal Society" en Londono prelegis pri la problemo "persisto de la vido" (angle: Persistence of Vision). Tiu ĉi estis la inaŭguro de la kinematografio, kvankam ĝia praktika solvo komenciĝis nur en la jaro 1891, kiam Edison patentigis sian rotaciantan filmomaŝinon.

Jozefo Major, Oldenburg.

Progreso en la Serurista Industrio.

La moderna seurista industrio konsideris sian ĉeftaskon provizi niajn trezorejojn per sekuraj instalaĵoj. Ciu el ni konas la elektrajn evost-signalajn kaj literarajn monŝrankojn. Tiuj ŝrankoj povas esti nur tiam malfermitaj, se oni konas la "cifron". Okazis ofte ke rabistoj per revolvero eldirigis tiun ĉi cifron. S-o Chubb, seuristaro en London, eltrovis nun ŝrankon kiel seuristaro estas kombinita ne nur kun literaro sed ankaŭ kun horloĝo. Oni povas ĝin malfermi nur je certa horo, kiam la ofiĉistoj ĉeestas. Sajnase ke per ilia apliko bankrabadoj malaperos.

Jozefo Major, Oldenburg.

Radio.

Reproso en nacilingvaj radio-gazetoj ne rekomendata!

La 28 junio lasta, en la sendstacio Praia Vermelha (S.P.E.), kiu apartenas al la Nacia Telegrafio, D-o Everardo Backheuser, profesoro de la Universitato, faris interesan paroladon por Esperanto, al kiu li donis la pensigan titolon: "Necesega komplemento al la Radiotelefonio". Ĝin finante li anoncis kurson de tiu helpa lingvo farotan ĉiŝabate de s-o ingeniero Luiz Porto Carreiro Netto kaj esperante salufis sian aŭdantaron.

Jam antaŭe, en 1923 kaj en la komenco de la nuna jaro, tiu sama sendstacio elradis esperantajn poeziojn deklamitajn de f-ino Maria Luiza Bocayuva.

Buffalo.

Je 7.50 horo vespere la 18 julio s-o D. E. Parrish parolis pri Esperanto de Radio-stacio W. G. R. Li promesis al aŭskultantoj sendi al ili lernolibretojn, se ili tion petas per karto al stacio W. G. R.

Radio-gazeto "Radio News", aŭgusta numero enhavas longan artikolon pri Esperanto de s-o J. D. Sayers el New York. Ankaŭ aliajn artikolojn favoraj al Esperanto.

D. E. Parrish.

Deklaracio.

La subskribinto — por eviti malkomprenejojn — deklaras, ke lia ofico ĉe la rumana polico estas profesoro de la lingvo Esperanto kaj neniam alian kvaliton aŭ kroman interrilaton li havas en tiu posteno.

T. Morariu, Sekr. de Esp. Centro Rum.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scilgoin (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto) anstataŭe skribita, sed ne inter administrativaj aŭ privataj scilgoin pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precize nomoj).

Ameriko.

Brazilo.

Dum la Unua Internacia Kongreso de Medicinaj Studentoj, okazinta en la lasta junio, s-o Natalicio de Farias faris bonegan paroladon pri "La neceso de la disvastigo de la lernado de Esperanto en la Medicinaj Fakultatoj".

S-o Natalicio de Farias estas prezidinto de la socio "Tertulia Academica", kiu konsistas precipe el medicinaj studentoj kaj havas esperantan kurson por siaj membroj.

La lernantoj de tiu kurso intencas interesigi la eldonistojn por la tradukado en Esperanton de gravaj medicinaj verkoj, kiuj restas nekonsultataj pro la malfacileco de la lingvo en kiu ili estas verkita.

Eŭropo.

Germanujo.

Cleve, la 5 aŭgusto. Pasintan dimanĉon, la 5 aŭgusto nia esperanta socio ricevis viziton de la 5at. gesamideanoj el la holanda urbo Nijmegen. Sub gvidado de la membroj Millecians, Hachmann kaj Giesen admiris la membron Roland beleon de la ĉarmanta urbo. Vespere estis en la hotelo "Monte Bello" festkunveno. La instruisto Schumacher el Cleve parolis pri "Esperanto kaj patruŝo". Li parolis tre klare kaj tial estis siaj vortoj tre kompreneblaj. 4 infanoj sekvis, parolante po poemon en sia kara lingvo. Bona muziko kaj multe da humoraj kantoj de diversaj samideanoj el Nijmegen kaj Cleve en esperanta, germana kaj holanda lingvo beligis la vesperon.

Oni ne venis el la ridado! La kantoj: la bela Otto, la Lenchen, Mi estas el Amsterdam, la Gazetvendisto rikoltis grandan aplaŭdon. Jam frue parolis la prezidanto Millecians la eksigvortojn kaj nome de la 40 gastoj respondis la prezidanto de la Nijmegen cirkulo, van Wehrhorst. Liaj vortoj finis en la espero sur baldaŭa revido en Nijmegen. Ni esperas, ke la bonaj rilatoj inter Nijmegen kaj Cleve ili restos.

Esperanto Cirkulo Cleve.

Crefeld. La grupo de Crefeld akceptis la 31 julio, en speciala kunveno, s-anon Agourtine el Paris. Salutparoladojn faris s-oj Rother, prez kaj Giesmann, Prof. en la knabino liceo. — En St. Thonis (apud Crefeld) post kurso gvidata de s-o Sanders, honora prez. de la grupo de Crefeld, vigla, malgraŭ siaj 72 jaroj, fondigis grupon.

Francujo.

La France Esp. Kongreso malfermiĝis la 2 aŭgusto en Strasburgo. En la honora komitato estas Generaloj Sebert kaj Bastien, Fréchier, Prof. en la Universitato, la konsulo de Belgio, Hispanujo kaj Usono, Vinay, direktoro de la liceo Kléber ktp. La 2a kongresanoj estis akceptitaj en la urbdomo de s-o Peirotes, urbestro kaj deputito. La 3a okazis propaganda parolado de Prof. Ververts, el la Universitato de Lille, membro de la Medicina Akademio.

Katalunujo.

Barcelona. La 3 aŭgusto okazis en la bela arbaro de Can Cabanyes, bieno kuŝanta apud Montmeló, la ĉiujara festo organizita de la esp. grupo Paco kaj Amo, kies celo estas soleni la datrevenon de la apero de la unua broŝuro pri Esperanto. La festo konsistis el du partoj: sporta mateno kaj arta vespero. En la unua, ni havis okazon admiri la vigelecon de kelkaj el niaj sportemaj samideanoj en plej diversaj gimnastikaj ekzercoj al kies gajnitaj oni disdonis belajn premiojn.

En la dua, poeziamantaj geesp-istoj regalis nin per recitado de ĉarmal-versaĵoj kiujn ni aŭskultis kun plezuro. Ankaŭ ni okazis kondamnamanta koncerto dum kiu ni ĝuis delikatajn muzikajn pecojn. Poste oni dancis la esperantistajn dancon La Rondo, kiu devis esti ripetata per insistaj aplaŭdoj. S-oj Dalman kaj Roig sin turnis al la multenombra ĉeestantaro parolante pri la graveco de tiu soleno.

Fine post dancado de sardanoj oni kantis entuziasme La Espero. Oni longe konservas agrablan rememoron pri tiu festo.

Dura.

Norvegujo.

Kristiania. Laŭ sciigo de la franca "Temps", la 3-a internacia Kongreso de akademijaj virinoj, okazinta de la 1 ĝis 6 aŭgusto en Kristiania, post diskuto akceptis kiel L. J. Esp-on, forpulsinte modernajn kaj antikvajn lingvojn

Aperis tradukiĉe de Henriko Seppik tri altnivelaĵaj verkoj de estona plej bona novelisto **Friedebert Tuglas.**

Novelaro:

Kvin noveloj. 175 paĝoj. Kun aŭtoro kaj artikolo de l' tradukinto pri la esona beletristiko. Fundamenta prezo: 3,5 sv. fk. Noveloj:

En la fino de la mondo. 56 paĝoj. Prezo: 1 sv. fk.
Popi kaj Huhuu. 52 paĝoj. Prezo: 0,50 sv. fk.
Arta traduko, Bela eksterjo. Luksa papero. Placa arango.

Por sendkostoj aldonu: Laitvoj kaj Litovoj 5%, aliaj landoj 10%.

Eldonejo M. Tamverk
Esperanto-fako.
Karja str. 5, Haapsalu, Estonio.

Nederlandaj Esperantistoj!

Ne forgesu vian devon **aboni** la Nederlandan Esperanto-gazeton

Holanda Esperantistoj.

Ĝi enhavas: Literaturon, Ekzerĉrubrikojn por komencantoj kaj progresintoj, Demandaron kaj ĉiujn aln aktualaĵojn

Petu specimenon de la Administracio:

Hazekamp 20 Zutphen.

Grava Alvoko.

Al ĉiuj tutmondaj samideanoj, kiuj deziras plene ŝanĝi sian nunan vivmanieron!

Esploristo, lomecie laciĝinta de dudekjara vojaĝado tra la tuta mondo, intencas havigi kun sia familio fondante en la duonovaĝa aŭ tute nova lando, kvietan, senzorgan, transvivan kolonion, vivonta nur mempere. — Kaj invitas ĉiujn esperantistojn, al kiuj la afero ŝajnas agrabila, tuj aliĝi kaj poste aliĝi al tiu ideo. — La aliĝintoj skribu al suba adreso, montrante nomon, agon, profesion, tendencojn, konsistigon de lia familio. — Tuj ili ricevos la unuan klarigon, poste oni interkonsentos milio. — Tuj ili ricevos la peroln, la preparojn ktp.

Mario Gagnatelli, inĝeniero, Colonnella (Teramo-Italujo).

Ĉiu Esp.-gazeto estas varmege petata represigi. Dankoin.

Membroj en pli ol 40 landoj!

Unua klubo por interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn, literat., papertonon ktp. kaj por korespondado kun la tuta mondo. Postulu prokspekton.

Fr. Jacobi,
Bahnhofstrasse 29
Coblenz - Germanujo

La plej granda marbanejo sur Adrio

Kupari apud Dubrovnik (Ragusa)

400 m sabla marbordo - 220 elegantaj ĉambroj
Bonega kuirrejo
Ĉiutagaĵ koncertoj - Amuzoj - Sporto

Propraĵo de **Dubrovacko Kupalisno i Hotelsko D. D.**
(Dubrovnik Baneja kaj Hotela Akcia Societo).

Jus aperis:

Gvidlibro tra Zürich

20 - paĝa, ilustrita, kun urboplano. Rekomendinda por partoprenantoj de la XVI-a.

Prezo nur sv. fk. 0.40

pagebla en sviaj poŝtmarkoj aŭ 1 nova egalvalora respondkupono. Por mendoj de 10 ekzempleroj sv. fk. 0.50 plus sendkostoj. Havebla ĉe

s-ino Sing, Zürich 6.
Turnerstr. 12

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉigo, edziĝo, morto, okazintaĵoj) gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) senpage. Aliaj anoncetoj, nur akceptataj por minimume du sinkvital impreskostoj po da enprezoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok BT-numeroj kontanti antaŭ pago. Abonantoj ĉe kiuj ni povas deprezi la pagon de la abonkonto, ĝuas por propra anoncetoj preferan prezon de kvin BT-numeroj. Germanoj pagas 2.- mk., prefera prezo por poŝtabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

GERMANAJ TURISTOJ! Du samideanoj, naturamantoj de la "Flandra Turista Unuiĝo" deziras biciklo-traveturiri Reinlandon. Alveno en Köln la 31 aŭgusto; reveno tie la 7 septembro. Celo: vizito de la Reinbordo ĝis Meinz-Frankfurt. Kiu germana samideano volas partopreni kun ni? Ni deziras korespondi pri tiu temo kun gesamideanoj de la Reinregiono; bildkartoĵoj (bfl.) (Ni estas 25 jaroj.) Remi Van Eynde, Uldredingsstraat 184, Berchem-Antwerpen, Belgujo.

FOTOGRAFĴOJ DE ESPERANTA-KARAVANO, kiu veturis trans Pralia 5.8 al XVI-a Universala Kongreso en Vien estas riceveblaj por kr. 2.- (kr. 0.50 en poŝtmarkoj) ĉe K J Kelebrant, Skosika 8, Praha II., Ĉeĥoslovakio

GRANDEGA PETO. Kiu scias ion pri s-o Siskia Sergej Petroviĉ, 22 jara, ofiĉintan lastatempe sur st. Borza de Ĉiuj fervojoj kiel helpanto de maŝinisto sur "brone-vojezd" (kiras-vojanaro) de l' nomo Trockij. La IV-25 j. li skribis leteron el st. Borza; la V. 25 j. li skribis jam el Vladivostoko (ne komunikinte sian adreson) kaj malaperis, plu mankas ĉia sciigo. Tregre kaj samideane mi petas sciantojn lian sintrovon komuniki al liaj malfeliĉaj gepatroj laŭ adreso: S-o N Jamski, fotografistoj, Ilinskaja 85, Saratov, Ruslando.

Dum v a libertemo viziti Mechelen (Malines). — Sonorilkoncerto ĉiulunde. — Programlibretojn kaj informojn petu al: A. Baessens, rue de la Station 16, Malines (Belgujo).

Korespondoj kaj Interŝanĝo.

S-o Voldemar Birk, Tallinn, Wambola 5-5, Estonio, deziras korespondi per il. PK bfl. kaj L nur kun orientlandanoj. PM ne kolektas.

S-o Voldemar Kivimägi, Katu-parki rta 10-5, Tallinn, Estonio, deziras korespondi per il. PK kun ĉiuj landoj.

S-o Antonio R. Hoviĉ, str. Piekna 68-A m. 15, Warszawa-Polujo, deziras korespondi per il. PK kaj L kun la tuta mondo.

S-o Guilloux Marcel, 40 avenue Besnardière, Angers-Francujo, interŝanĝi il. PK kaj PM kun ĉiuj landoj.

S-o Walter Steiner, instruisto, Kirchberg i. Sa., Weststir. Germanujo, deziras korespondi pri ĉiuj demandoj kun la tuta mondo.

S-o J. G. Gyenge, ofiĉisto, Timiŝoara, str. Telegraf 27, Rumanujo, deziras interŝanĝi il. PK (bfl.) PM kaj sportfotografajojn. Ĉiam respondos.

S-o Mikolaj Wieremicko, pocz. Snow, pow. Nieszwiezki, Tarekji, Polujo, deziras interŝanĝi il. PK kaj papertonon kun amikoj de ĉiuj landoj. Mi certe respondos ĉiun skribaĵon.

S-o Paul Koerth, juna instruisto, en Miedzychod (Warta), ul. Gorczyka 1, Polujo, deziras korespondi esperante kun la tuta mondo.

S-o Vladislav Oleksin, ul. Grodecka 1.45, upani Rozek, Lwow, Polujo, deziras korespondi per il. PK, L, ĵurnaloj. Mi interŝanĝas ankaŭ PM kaj papertonon.

100 diversaj germanaj PM 3 sv. fk. aŭ samvaloro. Afranko ekstra. Adreso: Reinh. Piffczyk, Gladbeck i. W., Höhenstr. 10, Germanujo.